-prelegantoj, - respondecoj por studperiodoj (akcepto de staĝanoj, librotenado), - helpantoj pri mastrumado, - ĉiuj, kiuj povas proponi interesan temon (jogo, naturo, teatro ...). Ni ne povas pagi salajron sed proponas rabaton au senpagan restadon (laŭ plenumitaj taskoj).

Se vi interesiĝas, ne hezitu informi nin pri viaj proponoj kaj spertoj.

Dankon. Henri Boyet

INSTRUU ESPERANTON EN JAPANIO

Japana entrepreno kun filioj en Fora Oriento serĉas kvalifikitan instruiston de Esperanto kaj de la angla. Salajro : 150 000 enoj monate (1 250 USD). Flugbileto de

Europo al Japanio kaj reen pagota. Ebleco loĝi senpage en apartamento de la kompanio (luprezo egalvalora al 15 000 enoj monate). Por detaloj kontaktu: Etsuo

Miyoshi

<e.miyoshi@swany.co.jp>.

KLASOJ SERĈATAJ POR KONTAKTOJ PER ESPERANTO

Instruisto de franca lernejo (klasoj de 12-17jaraĝaj gelemantoj) deziras kontakti kun kolegoj de similaj klasoj de Europo (precipe, sed ne nepre, de Hispanujo, Italujo kaj Rumanujo) por kunlabori pere de Esperanto, kadre de la Europa projekto Socrates-Comenius.

Jose' Manuel SORIA

<josemanuel.soria@wanadoo.fr>

Letters to the Editor.

Dear Eric,

Regarding your 'Personally Speaking in the last issue, don't you think that a lot of fun was had when we were trying to do things perhaps a little beyond our capacity—organising congresses and holidays and social events, and doing things which, now we are older would no longer be fun, but hardship and discomfort. Let's hope that the younger folk are having as much fun as we did. Now I enjoy myself in a totally different and quieter way. My best Esperanto holiday was with a group of no more than 50 people from about 10 different countries. I was the only one from England. Muriel Shackleton Bradford.

(Muriel also enclosed the winter programme of the small but diligent Bradford group.)

Helppeto por funkciigi la Projekton "Per-A-Por-E"
Saluton, karaj samideanoj!

En ĉi-letero ni petas vian helpon por funkciigi la projekton "Per-A-Por-E", kiun iniciatis la Jilin-provinca Esperanto-Asocio en Ĉinio. Kio do estas "Per-A-Por-E"? Ĝi signifas "Pere de anglalingva instruado, por Esperanta disvastigado".

Eble tuj al vi venas la demando: Kial vi intencas disvastigi Esperanton pere de anglalingva instruado? Ni prezentu per ekzemploj por la klarigo: 1, Almenaŭ ĉiuj lernantoj en Ĉinio devigite lernas la anglan ekde sia 13-jara ĝis 18-jara, se ili dauros en altlernejo, tio ankoraŭ dauros 3-4 jarojn; 2, en kelkcent urboj en Ĉinio, multaj gepatroj pagas por ke ilia sola fil(in)o lernu la anglan de sia infaneco; 3, ne nur la Pekina sed ankaŭ aliaj urbaj registaroj jam oficiale funkciigis la projekton "Ĉiuj urbanoj lernu la anglan". Tiu ĉi situacio pri la anglalingva instruado en Ĉinio tamen provizas bonan ŝancon por ke ni profitu de ĝi por disvastigi Esperanton. Tio estas, ni povas inviti anglalingvajn instruistojn esperantistajn de alilandoj kaj dum ilia instruado ili povas ankaŭ komprenigi Esperanton al siaj lernantoj, kaj plie, ili povas ĉeesti lokajn Esperanto-renkontiĝojn, aŭ instrui Esperanton en E-kursoj.

Tio estas ne nia fantazio, ĉar lastjare laboris en Ĉinaj universitatoj kelkaj alilandaj instruistoj esperantistaj, ekzemple S-rino Robin (el Usono), gesinjoroj Johano (el Australio), S-ro Rode (el Britio) kaj S-ro Paulo (el Australio), kiuj starigis Esperanto-kurson en la universitato kie ili laboris, vigle partoprenis en ĉinaj Esperantj kunvenoj kaj valore kontribuis al ĉina Esperanto-Movado.

Jen ĉefaj punktoj de la projekto "Per-A-Por-E": 1, Nia asocio finance funkciigas la projekton dum ĝia komenca periodo; 2, Ni provizas senpage al la invititaj instruistoj esperantistaj loĝadon kaj manĝadon; 3, Ni pagas al ili rekompencan ne altan tamen taŭgan; 4, Ni arangas ĉiujn aferojn rilate al la loka registaro; 5, Ni administras la projekton por ke ĝi finfine fariĝu memstara finance. Poste? Popularigi la praktikon tra Ĉinio.

Karaj samideanoj, por bone funkciigi la projekton ni jam detale planis kaj sufiĉe preparis. Nun ni intencas unue inviti 4-8 anglalingvajn instruistojn esperantistajn el alilandoj. Kompreneble ili devas esti kompetentaj instruistoj kaj de la angla kaj de Esperanto. Se iu el via asocio interesiĝas pri tiu ĉi projekto "Per-A-Por-E". Bonvolu respondi nin por plia informiĝo.

"Per-A-Por-E" estas projekto praktikebla en Interreta Tempo, funkciigita de honestaj kaj kapablaj esperantistoj, taŭga por konkretaj kondiĉoj de Ĉinio.

Bonvolu transsendi ĉi tiun informon al viaj amikoj esperantistaj!

Bondezirojn kun verdokoro!

--sincere via Ghispint

la ĝenerala sekretario de

Ĉina Jilin-provinca Esperanto-Asocio

Jilin Esperanto-Asocio

P.O. Kesto 1162, Changchun, CN-130021, Ĉinio

retposhto: kokosoto@263.net kokosoto@163.net

TTT: <http://www.kokosoto.org/>

To EAB members and Supporters. I have mentioned that there exists to 'electronic conferences' or 'chat rooms' in the Internet email system. One of them is called 'individuaj-membroj' and the other 'UM-membroj' (there are other discussion groups as well but these are the two which I view. As at middle of September there is a discussion going on about whether changes should be made to the 'UEA delegate system' and to the content of the UEA yearbook. Here is one contribution to the discussion from Humphrey Tonkins, former President of UEA and, when younger, very active in TEJO (the youth section). I thought you might find it of interest. Intermixed in Humphrey's letter are several points made by other people. These are indicated by the << symbol. Eric Walker.

"Pardonon, ke mi ensaltas en la mezon de tiu ĉi temo. Jen kelkaj pensoj, kiujn mi lastatempe sendis al Giorgio Bronzetti, kiu alsendis al mi kelkajn antaŭajn mesaĝojn, kiujn mi maltrafis. Vi vidos, ke miaj ideoj evidente estas iom kongruaj kun kelkaj ideoj jam esprimitaj: <<Mi volonte havus okazon iam sidi kun kelkaj saĝaj homoj por priproli la tutan demandon ne nur de la delegita reto sed de servoj al membroj ĝenerale, kaj servoj de la membroj al aliaj membroj. La nuna sistemo de Delegitoj kreigi en alia epoko, kaj la demando pri memromarkoj ktp. evidente ne funkcias en elektrona epoko.

<<Mi ankaŭ ne estas konvinkita, ke la nuna enhavo de la Jarlibro estas taŭga. Eventuale indus krei pli vastan liston de membroj de UEA, kiuj indikas, kiujn servojn ili pretas fari (ili povus elekti el iu menuo). Tiu listo estu komputile alirebla kaj regule ĝisdatigata. En ĉiu lando estu nur kelkaj formale nomataj Delegitoj pretaj teni superrigardon super la pli vasta sistemo kaj ĝin evoluigi. Ĉiu membro rajtu senpage ricevi, ni diru, du fojojn jare tutan elprinton de la listo au elprinton de iu parto de la listo (temus pri malalta elspezo por la Asocio; liveri ĝin povus esti tasko de la Ĉefdelegito). Do, ĝi ne aperu en la Jarlibro: ni uzu tiun spacon por doni bazajn faktojn pri Esperanto kaj la Asocio, iom laŭ la formo de almanako (biografioj de grandaj verkistoj Esperantaj, skizo de historio de la E-movado, historio de la Universalaj Kongresoj; klarigo pri la strukturo de UEA, klarigo pri kiel oni povas aktivi en la E-movado kaj aparte en la Asocio, ktp. ktp.) Tiu faktaro konsistu el facile kompilebla kaj ĝisdatigebla materialo. La kategorio Membro kun Gvilibro malaperu. Ni eventuale rekonceptu la formaton kaj prezenton. <<Sed tiuj estas nur miaj tre neelpensitaj ideoj. Vi certe havas pli da ideoj, iom pli profunde elpensitaj. Mi volonte legus ilin."

Humphrey Tonkins.

Surprizo

Mastrino : Kiel povas okazi, Mariano, ke ĉiufoje, kiam mi envenas la ĉambron, mi trovas vin sen okupo ?

Servistino : Kulpas viaj pantofloj ; oni ne aŭdas vin venante.

Karaj amikoj,

Mi ricevis la jenan de kubano. Se vi povas helpi, bonvolu sendi la pakajon al:

Prof Jose de J. Campos Pachecho,
calle 10 %29y31 escl 2908
piso 3 apt F-6
Pedro Betancourt- Matanzas
Cuba -42700

2001 aŭgusto 10 : Jose de J. Campos Pacheco, Pedro Belancourt, Matanzas, Kubo

Mi estas kubana junulo (26 jara).....Mi profesie laboras instrui la anglan lingvon en urbo Matanzas.Semajnfine mi revenas hejmen kie mi instruas Esperanton al la geinfanoj, kiuj estas 9-12 jaraj. Tiu laboro tre gravas al mi. Ili lernas per ludoj kaj kantoj. Dum la somero de la jaro 1998 okazis en mia lando la unua nacia infanrenkontiĝo en urbo Guantanamo, la plej orienta provinco de Kubo. Mi partoprenis kun kvar geinfanoj. Ili ludis, kantis kaj aktoris.

Mi deziras scii ĉu vi aŭ estroj de lernejoj, teatroj, kulturdomoj, muzeoj aŭ bibliotekoj povas kunlabori kun miaj infanklasanoj. Ni bezonas **gantopupojn, fingropupojn aŭ gumajn maskojn**. Mi tutkore dankos se la helpo eblos. (por la adreso kontaktu La Verda Drako). Mi devas informi vin ke pakajo devas esti malgranda (laŭ kuba leĝo poŝtpakajon pli peza ol 2 kilogramoj oni ne rajtas ricevi.)

Derek Fielding

(Vizitu nian klubpaĝon ĉe <http://verdadrako.50g.com>)

(Continued from page 1)

as well as the Oxford Group and an International Year of Languages conference in Birmingham. Between times, I fit in meetings with luminaries such as Eric Walker, Joyce Bunting, Geoff King, Ian & Helen Fantom, Brian Burnett and Hilary Chapman, ManCom, and rather irregular attendance at the Glasgow and Edinburgh Groups. The Congress in Zagreb provided a convenient opportunity for updates with Paul Gubbins on *La Brita Esperantisto* and Terry Page on the forthcoming AGM/ Congress.

All this visiting and swapping of notes has got me thinking about organisation and communication and I'm beginning


to wonder whether there might not be a bigger role for federations than in the past. Regular attendance at local clubs - not just in the Esperanto movement - is less common than in the past, but people still want something more than the Internet and the occasional magazine through the letter-box. The answer may be occasional "regional" get-togethers for regular club-attenders, occasional attenders and non-attenders (who are often too far from a group); these have to be reasonably accessible - i.e. not just national events - which seems to suggest the federations as key players. I'll be developing these ideas and discussing with activists as I move around.

The next fixture in the EAB calendar is *Ni Festivalu* at Barlaston in January. As you know, we usually combine several activities in that weekend. This year I thought we might try and get together some of our key activists for a bit of mutual encouragement and swapping of notes; also, perhaps, as many as possible of our postal tutors, for a similar kind of development exercise. Details will follow (he said, optimistically).

Finally, I should mention the Book Service and the revamped Secondhand Book Service (Do you think *Librokanto* - get it? - would be a good name for it?). Sales have continued steadily but we still have bigger stocks of some titles than we need, so ManCom has agreed to some heavy discounting. Watch this space and start saving!

I think that's about as much space as Eric will allow me, so for now - *Ekuj kaj disvastiĝu!*

David Kelso - Director of Development



The Esperanto names of the planets, in their normal order from the sun, are: *Merkuro, Venuso, Tero, Marso, (Astroidoj), Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno, Plutono*. At this year's Barlaston summer school, Kay Sanders composed this helpful mnemonic: *Mi Volontulis Traduki Maldecaĵojn Antaŭ Jaroj, Sed UEA Ne Permesis.*

La 30-an de Julio – 12-an de Aŭgusto, 2001 okazis vica XVI Ekspedicio laŭ la rivero Dnestro. Organizis ĝin anoj de Odesa junulara Esperanta klubo “Verdaĵo”; entute partoprenis 23 personoj el Odessa, Kirovograd (Ukrainio) kaj Lodz (Pollando).

La ekspedicio estis dediĉita al natursploro kaj naturprotekto de belaj ĉirkaŭaĵoj de Odessa -- Dnestra delto, unu el tutmonde protektataj akvomarcĉaj teritorioj. La partoprenantoj de la Ekspedicio ekskursis al lago Blanka, kie pompe floris tiutempe blankaj akvaj lilioj, aŭ nimfeoj. Sur flosantaj rondaj folioj de tiuj plantoj nestis blankvangaj ŝternoj. Ĉi-jare la alta akvo staris tre longe, kaj pro tio la birdetoj ne povis elkovi idojn ĝustatempe, do eĉ komence de aŭgusto ni vidis iliajn nestojn el sekaj branĉetoj kaj sur ili -- po 2 brunetaj ovojn. Kaj en kelkaj nestoj videblis eĉ ĉarmaj lanugaj buletoj – la ĵus elkovitaj birdidoj.

Sur malgranda parto de la lago ni kalkulis 170 nestojn kaj ringumis 70 birdidojn. Sekvajare ni ekscios, kiom da birdoj elkreskos kaj revenos al sia patrujo.

Alia bonfara afero de nia ekspedicio estis konstruo de nesto por aglo. Haliaetoj estas raraj rabobirdoj, kiuj vivas ĉiam apud akvo. Longeco de ĝiaj plene etenditaj flugiloj atingas eĉ 2 metrojn. Kaj por tiu “birdeto” kaj ĝiaj 2 infanoj ni konstruis neston sur la arbo. La nesto konsistis el arbotrunkoj kaj fortaj branĉoj, diametre pli ol 2 metrojn. Ni esperas, ke haliaeto (blankvosta aglo) aprezos nian gastamecon kaj ekloĝos en la nova domo. Estus bone, se ankoraŭ unu juna paro de agloj najbaros nian ekspedicion “Dnestro-2002”.

Interalie, la sovaĝan vivon de Dnestra delto povas ekvidi ne nur tiuj kuraĝuloj, kiuj alvenis al ni por vivi en tendoj kaj ĉiutage senti la veran naturan vivon inter verdaĵo, kiam la suno leviĝas kaj subiras ambaŭflanke de la rivero, ordonante la tutan nian tagordon.

Certe, aromon de freŝa fojno, teneran plaŭdadon de riverondoj, kareson de suda aŭgusta suno povas rememori nur tiuj, kiuj vere travivis tion. Sed ekvidi la sovaĝan naturon de la Dnestra delto povas ĉiu, sur la kasedo “Sovaĝa vivo de sudaj kanejoj”, produktita de anoj de Odesa filio de Ukrainia Birdoprotekta Societo, Odesa junulara Esperanta klubo “Verdaĵo” (Ukrainio) kaj Jokohama Esperanto-Rondo (Japanio). La premiero de la

filmo okazis dum SAT-Kongreso en Nagykanisza (Hungario, 2001); poste ĝin spektis partoprenantoj de la UK en Zagreb, Kroatio. Dum la Universala Kongreso la filmon oni montris 4-foje, kaj ankaŭ aparte dum la Junulara Programo.

Ni esperas, ke tiun filmon rigardos pli multaj homoj en Esperantujo, kaj tial ili ekkonscios pri la belaĵoj de la naturo. Kaj Odesa junulara Esperanta klubo “Verdaĵo” (verda – koloro de juneco, de naturo kaj de Esperanto) ĉiam pretas akcepti gastojn kaj montri al ili nian mirimdan naturon kaj nian belan urbon.

Ni renkontiĝu dum “Dnestro-2002” !

Tatjana Auderskaja.

Fractured English.

At entrance to a Bangkok temple:

“It is forbidden to enter a woman even a foreigner if dresses as a man”.

Hotel room notice, Chiang-Mai, Thailand:

“Please do not bring solicitors into your room”.

Hotel brochure, Italy:

“This hotel is renowned for its peace and solitude, in fact, crowds from all over the world flock here to enjoy its solitude”.

Hotel lift, Paris:

“Please leave your values at the front desk”.

Cocktail lounge, Norway.

“Ladies are requested not to have children in the bar”.

Car rental brochure, Tokyo:

When passenger of foot heave in sight, tootle the horn, trumpet him melodiously at first, but if he still obstacles your passage then tootle him with vigour”.

Nova katalogo de libroj kaj broŝuroj

senpage havebla de Austria Esperanto-Movado

AT-1050 Wien, Margaretngurtel 100/11

Aŭstria. Estas 18 eroj kaj vi povas,

se vi estas membro de UEA,

pagi facile laŭ la UEA banka sistemo.


Skramblo!

(en Esperanto)

ideala kluba ludo
por individuaj aŭ teamaj ludantoj
tre taŭga por surplanka ludado



TWO NEW ESPERANTO GAMES FOR YOU TO TRY AT YOUR MEETINGS!



Introductory Offer
£10 + £1.14
postage & packing
for each game


SKRAMBLO

is a game for up to six teams. It is based on the board game 'Scrabble', but is played on the floor of the hall or room where the meeting takes place. It helps to build up a useful Esperanto vocabulary and gets everybody thinking Esperanto. Contains 111 laminated 8.5 x 8.5 cm cards in a compact box.

LA REGNO DE LA ANIMALOJ
is a game for up to five teams. It too is played on the floor, but this time the aim is to build up words syllable by syllable. It helps to reinforce Esperanto pronunciation and get people speaking correctly in Esperanto. Contains 115 laminated 8 x 9.5 cm playing cards with 5 picture clue cards, master answer card and instructions

Cheques payable to 'Angela Tellier' should be sent, with order, to:


Angela Tellier, 10 Marina Gardens, Felixstowe, IP11 2HW, Suffolk. Tel: 01394 271683



La Regno de la Animaloj

en Esperanto

ideala kluba ludo
tre taŭga por surplanka ludado



KIEL ATENDI

GUY BROWNING [GAJ BRAUNIN]

La flanko la plej malagraba de la atendado estas la atendado. Laŭdire neniam bolas rigardata bolilo, sed tio veras nur se oni tiel absorbiĝas en la rigardado, ke oni dekomence forgesis ŝalti ĝin.

Ĝenerale necesas longa tempo por lerni la arton de atendo. Estas tri specoj de atendo: atendi sian vicon, atendi kirurgian operacion, kaj atendi la alvenon de sia princo. Ofte okazas ke, ĝuste kiam oni kredas ke estas la vico por la operacio, la princo alvenas kaj oni devas subite kaj senprokraste decidi ĉu edziĝi kun galŝtono.

Iujn la atendado ne ĉagrenas, ĉar ili posedas la paciencon de sanktulo. Mi klarigu, ke ĝenerale tio rilatas al la pacienco de Sankta Ralph [Ralf] la Pacience Suferanta, ne al la pacienco de Kevin la Kolerema. Al aliaj tre plaĉas atendi, ĉar tio donas la perfektan pretekston por eviti ĉiun alian aferon. Tiuj pasigas la tutan vivdaŭron atendante ĝis io okazos. Fine mortinte, eble oni troviĝos en granda atendejo. Ne la atendejo por la Fina Juĝado. Jam juĝite, oni estos en Infero. Se vi ne certas, kontrolu la gigantajn stakojn de *Ina Regno* [*Woman's Realm*].

Fakte atendi estas populara sporto. Plej eminentas la Damoj de la Atendo [ladies in waiting]. Nuntempe estas dekjarlonga listo de atendantoj antaŭ ol oni povos komenci atendi. Ofte oni aŭdas kverulajn rimarkojn pri io nomata la atenda ludo. Tio estas kiam oni atendas por scii, ĉu oni estas venkita. Se ne, oni venkas.

Atendejoj estas la ĉambroj kie homoj atendas. Tuj post la eniro en atendejon, kontrolu, ke la pordo tra kiu vi supozas ke vi eliros, ne kondukas nur al plua atendejo tra kiu aliaj homoj atendas iri.

La sola diferenco inter sidĉambro kaj atendejo estas ke oni ne anticipas ke io okazos en sidĉambro. Ebla escepto estas kiam oni havas adoleskantajn infanojn – tiam la sidĉambro iĝas la ĉambro por atendi la fruan matenon.

Averaĝe dum dek du procentoj de la plenaĝvivo oni atendas. Kompreneble, senĉesa demando de la vivo estas, "Kial ni atendas?" La respondo estas, ke iu iĝas nin atendi, kaj la kialo estas ke la persono faras ion alian farendan senatende. Do, la maniero mallongigi la daŭron de la atendo estas iĝi unu el la aferoj fendaj senatende. La tradiciaj elektoj estas la tempo kaj la tajdo, kiuj atendas nenium viron (ili atendas virinojn, sed pli longe daŭras la ina pretiĝo).

Tradukita de Michael Cayley

Falsaj Ĝemeloj

Jam	already	jam	konfitaĵo
Kanapo	sofa	canopy	baldakeno
kapo	head	cap	ĉapo
kastoro	beaver	castor	rulileto
kavo	cavity	cave	kaverno
klapo	valve	clap	aplaŭda manfrapo
kojno	wedge	coin	monero
konkuri	to compete	to conquer	venki
konvena	suitable	convenient	oportuna
korno	horn	corn	greno, kalo

Ĉiutaga Esperanto

LA ROMIANOJ NUN ALVENAS ANGLAN URBON

“La romianoj venos”

“Kion vi volas diri(*mean*)?”

“Ĉu vi ne scias, ke mi loĝas en praromia kolonio (*ancient Roman settlement*)?”

“Tute ne!”

“Nu, la romianoj establis ĉe ni salindustrion antaŭ preskaŭ du mil jaroj, kaj eĉ ankoraŭ oni produktas salon. Eble ĝuste nia salo troviĝas sur via table”

“Ĉu vi mokas min?”

“Tute ne! La arkeologoj (*archaeologists*) ĵus elfosis romian vojon, kaj en la loka biblioteko estas konstanta (*permanent*) ekspozicio de romiaj artfaraĵoj (*artifacts*), ekzemple (*such as*) potoj, vazoj, skulptaĵoj de dioj kaj diinoj, eĉ farmaparatoj kaj iloj.”

“Sed vi ne diris kion vi celis (*driving at*), dirante (*when you said*), ke la romianoj venos, ĉu ne? Ĉu temas pri italaj enmigrintoj (*immigrants*)?”

“Ne! Ĉu vi ne aŭdis pri la romianajasocioj, kies membroj vestas sin en detale kopiita kiraso (*armour*), kaj portas lancon (*spears* – see note) kaj aliajn aĵojn? Ili ankaŭ prezentas grandajn batalilojn, ekzemple katapultojn kaj sieĝmaŝinojn.”

“Ĉu ili sieĝos (*lay siege to*) vian urbon?”

“Nepre ne (*certainly not/no way*)!”

“Ĉu la afero altiros (*attract*) multe da homoj?”

“Ho jes! Kaj ankaŭ la vendistojn de terpomflakoj (*crisps*) frititaj terpomoj (*chips*), viandopasteĉoj (*meat pies*), kaj aliaj frandaĵoj. La infanoj certe ne deziras la vespermanĝon kiam ili revenos hejmen.”

“Kiom longe daŭros (*lasts*) la afero?”

“Dum tuta semajnfino.”

“Ĉu estos tie resaltiga kastelo (*bouncy castle*)?”

“Nun mi scias, ke vi mokas min, Ĉio nepre estos vera kopio de io en la pramondo”

Don Lord

Notes.

1. *Romano* is a Roman from Rome. All others are called *romianoj*. Roman citizens throughout the Empire were *romiaj civitanoj*.
2. In early Esperanto we used *-ologio* for the science, and *-ologiisto* for the scientist. Nowadays we use *-ologo* for the scientist. However, *-ologiisto* is not wrong.
3. *-ante* is used for the time (when) and the means (by). It is neat and standard.
4. When a number of people have one thing each we use the plural in English, but the singular in Esperanto. “*The soldiers waved their caps*” is translated “*La soldatoj svingis sian ĉapon*”. Similarly, “*The Romans carried spears*” is “*La romianoj portis lancon*”. If ambiguity could occur, use *ĉiu*. *Tiujriveroj havas ĉiu sian fonton en la montaro*. because we cannot otherwise tell whether they have a common source or not. With *ĉiu* they don’t.
5. For English *chips* the dictionaries give *terpomfingroj*, but I have never actually heard the word used. I have heard *pomfritoj*, and strictly speaking *frititaj terpomoj* means *fried potatoes*, which need not be french fries, whatever PIV says! All comments will be gratefully received.

The definitions of *kareo* and *pasteĉo* given in PIV are too narrow, and in my view misleading. The “*Internacia Kuirlibro*” uses *pasteĉo* for a pie baked in a dish and having a pastry top. (p.106). Too few cooks have written our dictionaries! All comments welcome.

N.B. PIV is “*Plena Ilustrita Vortaro*”.

New members

G. Gillard,

Bryony Freeman

Weston Super Mare

London E15

Office hours at Barlaston.

Tuesdays and Wednesdays—9am to 5pm.

Thursdays 10am to 2pm.

Please telephone during the above hours if possible.

Free Anti-Virus Software. We are told this can be got from www.grisoft.com

Neatendita respondo

Dum kelka tempo antaŭ la unua monda milito Princo Bismarck, la nepo de la ‘fera kanceliero,’ estis dua sekretario de la germana ambasadoro en Londono.

Certa germano, kiu loĝis en Anglio kaj suferis de mensa malsano, estis translokita en frenezulejon. Liaj amikoj en Germanujo sendis demandojn pri li al la Londona ambasadoro. La ambasadoro komisiis la junan Princon, trastudi la aktojn de la afero kaj poste pridemandi persone la aŭtoritatojn de la frenezulejo. La princo do veturis al la azilo kaj prezentis sin al la gardisto ĉe la pordego dirante: “Mi estas Princo Bismarck”.

“Ho!” diris la pordisto, “envenu nur, vi trovos ĉi tien Napoleon kaj Shakespeare kaj Dante kaj ĉiujn eminentulojn de la mondo”. Oni ne scias, kion Princo Bismarck respondis.

1		2	3		4	5		6
		7						
8	9				10		11	
12						13		
					14		15	16
17		18		19				
	20							
21				22		23		
24				25				

Solvo de la Enigmo en Update 14

Horizontale.

1. Glad 4. Oper 7. Lir 8. Azi 8. Eono
11. As 12. Cens 14. Nokt 16. Id 17. Te
19. Kor 20. Zorg 22. Um 23. Robo
24. Alpo 26. Ejo 28. Oaz. 29. Ĝui 30. Ne

Vertikale

1. Glaci 2. Li 3. Aren 4. Ozon 5. Pi
6. Rostr 8. An 10. Ostroj 11. Akompan
13. Edzo 15. Okulo 18. Eg 21. Obei
23. Ruĝ 25. Oz 27. On

(R) = Uzu nur la radikon

HORIZONTALALE

- 1 Libera spaco, ĉirkaŭita de domoj, en urbo. (4) (R)
- 4 Ekvidi aŭ renkonti ion, kion oni serĉas. (4) (R)
- 7 Oni legas ĝin. (5)
- 8 Ĝi estas parto de okulvitroj kaj plibonigas la vidkapablon. (4) (R)
- 10 Ami per respektoplena pasio. (4) (R)
- 12 La unuo de mezuro de la rapideco de ŝipo. (5)
- 13 Sufikso, kiu signifas instrumenton au aparaton. (2)
- 15 Sufikso, kiu montras homon, kiu povas naski idojn. (2)
- 17 Mensa malsano, karakterizita per timo al la malplenaj spacoj. (9) (R)
- 20 Tropika frukto. (5)
- 21 Ofte bonodora floro kun dornoj. (3) (R)
- 22 Tute simila. (5) (R)
- 24 Loko. (3)
- 25 Muzika sono. (4)

VERTIKALE

- 1 Pola kaj bohema danco. (4) (R)
- 2 Speco de arbo. (4)
- 3 Rezervujo por akvo. (7) (R)
- 4 Prepozicio, kiu signifas specon de movo. (3)
- 5 Mordeti. (4)
- 6 Artiklo de komerco. (3) (R)
- 9 Aferoj por solvi, kiel ĉi tiu. (7)
- 11 Unu el la donacoj, donitaj de la tri saĝuloj al Jesuo. (7)
- 14 Hebrea pastra vesto. (5)
- 16 Pluraia pronomo de la unua persono. (2)
- 18 Verda loko en la dezerto. (4)
- 19 Eksciti, maltrankviligi. (4) (R)
- 21 Prefikso, kiu montras ripeton. (2)
- 23 Prepozicio. (2)

Esperanto-Asocio de Britio.

Redaktoro

Eric Walker

Downham Reach Cottage
Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Tel: 01473 717 088

Fakso: 01473 274 531

Retpoŝto: eabupdate@esperanto.org

Obituary. We regret to announce the deaths of:

Mrs. Edith Varley of Lancashire.

J. Richard Evens of Bristol.

Alan Smalley of Leeds.

Calendar of Events..

Nov. 23-24-25 Trip to UEA Open Day Rotterdam. Contact Eric Walker for details.

December 27-January 3 or 4. 18th Internacia Festivalo. Magdeburg, Germany. A very good New year event. Ask EAB office for more details. Your editor may go and anyone is invited to go with him.

Jan. 18-20. Ni Festivalu! At Barlaston.

March 2. Esperanto Day at Barlaston.

March 29-April 5. 18th Spring International week at Waldfishbach-Burgalben South West Germany near Kaiserslautern.

Full cost £167-£186 depending on when you register. Well organised annual holiday. Leaflet available from EAB office.

May 17-19. SATEB weekend at Barlaston. All welcome!

May 24 - 27, 2002. 97th Scottish Esperanto Congress, St. Andrews

Info: Tom Neil, 37 Soutar Crescent, Perth PH1 1QB

Tel: 01738 623 699 E-mail: tomneil@tinyworld.co.uk

June 2-10 Baltic Sea Int. Holiday. Details E. Walker.

Aug. 10-16. Esperanto Summer School at Barlaston. Put this in your diary NOW!

NOMINATIONS FOR MANAGEMENT COMMITTEE

Candidates for the Management Committee of EAB should be paid up full or Life members and should be nominated by two other paid up full or Life members.

Nominations must be received at the EAB office at Barlaston not later than 31st January 2002. Candidates should be aware that as well as attending six meetings during the year, one of which is a residential weekend, there is considerable discussion, mainly by email, of matters currently before the committee.. There is no remuneration apart from legitimate expenses.

Candidates are requested to send in a concise biography of their work for Esperanto in the past and their vision for EAB over the next 5 years. Not more than 200 words.

Nomination Forms (the example below may be cut out or photocopied and used) must reach the EAB office not later than 31st January 2002.

Any Resolutions to be put to the AGM should likewise reach the office by 31st January 2002

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITIO Registered Charity no: 272676

Wedgwood Memorial College, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG

Nominations for the Management Committee for the period from 2002 AGM to 2003 AGM

Name of candidate.....

Proposed by:

Name.....

Address.....

I declare that I am a paid up full member of EAB

Signature.....

Seconded by:

Name.....

Address.....

I declare that I am a paid up full member of EAB

Signed.....

Agreement of nominee:

Name.....

Address.....

I accept nomination to the Management Committee of EAB.

I declare that I am a paid up full member of EAB.

Signed.....